


Nº 05 - MAJ/93

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República 54-29 andar - 20.211 - Rio de Janeiro-RJ BRASIL



IMPRESSO

KUNSIDO DE LA TRI PREZIDANTOJ

La 30an de aprilo la prezidantoj de BEL, KKE kaj BKE kunsidis ĉe sidejo de la Kooperativo kaj, dum pli ol kvar horoj, diskutis problemojn de la brazila movado. La ĉefaj rezultoj de tiu renkontiĝo estos baldaŭ diskonigitaj.

ESPERANTO EN RADIO KOPAKABANA-RJ

Ekde la 3a de marto 83, Radio Kopakabana disaŭdigas, ĉiuĵaŭde, kvinminutan nacilingvan priesperantan programon sub la aŭspicio de BEL: 23.25/23.30h (loka horo), 680 khz - kaj 5.015khz Nomo de la programo: UMA PONTE SOBRE O MUNDO (PONTO SUR LA MUNDO). Ni estas pretaj disaŭdigi malgrandajn mesaĝojn preparitajn de iu ajn esperanta asocio, kondiĉe, ke ili alvenu jam ĵurnalisme redaktitaj kaj enhavu disvastigindan tekston. La tekstoj de la programoj jam surbendigitaj (Marto, Aprilo kaj Majo) estas dispone - blaj ĉe nia libroservo por fotokopiado.

SDUDENTA KURSFINA PROJEKTO FAVORE AL ESPERANTO

Studento pri vida komunikado, ĉe Belarta Lernejo (Federacia Universitato de Rio de Janeiro -UFRJ) preparas kursfinan projekton, kiu konsistos el serio da afiŝoj, libro - kaj disko-kovriloj kaj prospektoj, estetike aranĝitaj. Rimarkinde estas, ke la studen to pri kiu ni parolas, NILTON PESSANHA SARAIVA, ankaŭ lernas E-on kaj elektis la disvas tigadon de la internacia lingvo kiel centra temo por sia tasko. Post la prezento de la projekto al la respondeca professoro, la grafika artisto RUI DE OLIVEIRA, la aŭtoro donacos la tutan materialon al BEL.

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIO: NOVA ESTRARO

Ni ankoraŭ ne scias la nomojn de la novaj estraranoj elektitaj la 30<u>an</u> de aprilo lasta, tamen ni volas jam nun diri: bonvenon kaj plenan sukceson!

NITERÓI ESPERANTO-KLUBO : OMAĜO AL ZAMENHOF

Omaĝe al la tago kiam forpasis Zamenhof, Niterĉi Esperanto-Klubo aranĝis kunvenon en sia sidejo (Rua São Pedro 10, 24.000 - Niterõi - RJ), la 14an de aprilo pasinta. La prezidanto de BEL ĉeestis la okazaĵon, dum kiu paroladis D-ro JOAQUIM DO COUTO, prezidanto de NEK. Aro da artistoj regalis la ĉeestantaro per arta programo.

9a SAN-PAŨLA ESPERANTO-RENKONTIĜO - 21a kaj 22a de majo 1983

Esperanto-Asocio de San-Paulo kaj Jundiai Esperanto-Grupo kalkulas je via ĉeesto la - 21an kaj 22an de la kuranta monato ĉe Jundiai-SP (Centro Jundiaiense de Cultura - Rua Barão de Jundiai nº 109), kie oni havos la ŝancon audi, paroli kaj diskuti pri "DIS - VASTIGADO KAJ INSTRUMETODOJ DE ESPERANTO ". Apogantoj: Sekretariejo pri Edukado Kle rigo, Sporto kaj Turismo de la urbodomo de Jundiai. Inter la kunlaborantoj ankaŭ tro-viĝas Sorokaba Esperanto-Klubo.

ELEKTO DE KOMITATANO "A"

Prof. SYLLA CHAVES estas reelektita Komitatano "A" por tri jaroj komence de la 68a. U.K. La propono farita de BEL en la Bulteno N-ro 03/33 estis favore akceptita de niaj membroj.

PARTOPRENO EN LA 68a. U.K. - Budapesto

Se vi bone parolas E-on kaj intencas ĉeesti la 68an U.K. en Budapeŝto, bonvolu kontakti, SYLLA CHAVES, kiu estas la komitatano reprezentanta BEL ĉe UEA. Li volonte indikos vin, kiel anstataŭanton, kondiĉe, ke vi bone pristudu la diskutotajn temojn kaj informiĝu pri nia vidpunkto rilate al ili. Li ne povos ĉeesti la kongreson en Budapeŝto, sed intencas iri al Vankuvero.

VETERANOJ ATENTU!

Veterana Esperantista Klubo decidis dum la ĉefkunveno en Antverpeno, kiel kontribuo al la 100-jara jubileo de Esperanto, registri ĉiujn vivantajn esperantistojn, kiuj lernis - E-on antaŭ 1948. Se vi estas unu el tiuj niaj samlandanoj, kiuj apartenas al tiu speciala grupo, bonvolu tuj kontakti S-ino CEDILHA NETO (Av. 13 de Maio, 47, sobreloja 208, 20-031 - Rio de Janeiro, RJ).

ESPERANTO-GRUPO ISMAEL GOMES BRAGA - NOVA KURSO

Lau informo sendita de nia Samideano PAULO ANDRADE DOS SANTOS, ekfunkcios en la sidejo de tiu societo nova esperanto-kurso por komencantoj, la 17an de la kuranta monato (Rua Silva Cardoso, 673 - Bangu - Rio de Janeiro - RJ).

LIBROSERVO DE BEL : NOVAJ TITOLOJ DISPONEBLAJ

- NUEVA METODO DE ESPERANTO (para clases y autodidactas), Fernando de Diego, Eld. Herol do de E-o, Madrid, 1932, 214 p., Cr\$ 3.200,00;
- PAŜOJ AL PLENA POSEDO (progresiga lernolibro de E-o kun lingvaj ekzercoj), William Auld, Eld. Heroldo de E-o, Madrid, 1980, 229 p., Cr\$ 4.500,00;
- PRIMEIRO MANUAL DE ESPERANTO, Eld. Federação Espírita Brasileira, 1933, 68 p., Cr\$...
- BESTETOJ, BESTEGOJ KAJ BESTAĈOJ, Sylla Chaves, Eld. Liga Brasileira de Esperanto, Fundação Getúlio Vargas kaj Sonoviso, 1983, Cr\$1.200,00 (libro), Cr\$ 1.300,00 (kasedo);
- ESPERANTO SEM MESTRE, Francisco Valdomiro Lorenz, Eld. Federação Espírita Brasileira, 1978, 396 p., Cr\$ 1.340,00 ;
- KIALO DE L'VIVO (Racia Solvo de la Problemo de l'Ekzistado), Léon Denis, Eld.Federação Espírita Brasileira, 1982, 48 p., Cr\$ 160,00 ;
- VOCABULÁRIO PORTUGUÊS-ESPERANTO/ESPERANTO-PORTUGUÉS, Carlos Domingues, Eld. Liga Brasileira de Esperanto, 1983, 233, p., Cr\$ 1.300,00.
- EINSTEIN, LA ENIGMO DE LA MATEMATIKO, Humberto Rodhen, Eld. Societo, Francisco Valdomi ro Lorenz, 1978, 130 p., Cr\$ 780,00.

LA LIBRO DE LA MONATO

MAHATMO GANDHI, Humberto Rodhen, Eld. Associação Esperantista do Rio de Janeiro, 1972, 183 p., Cr\$ 1.000,00.

La libro pritraktas la ideojn kaj idealojn de mistika politikisto. Rodhen priskribas - diversajn aspektojn de la vivo de la Mahatmo. Jen kelkaj titoloj: Gandhi-homo superinta la mistikon; Ĉu la principo pri neperforto estas socie praktiebla ? Gandhi antaŭ la kristanismo; La mistero pri fasto kaj preĝo; La sango de la Mahatmo sigelas la amikecon inter la landoj. Resume: aktuala kaj leginda verko!

AUD-VIDA PROGRAMO SABATE, LA 28an DE MAJO

Sabate, la 28an de majo, je la 6a horo vespere, en la sidejo de BEL, prezentiĝos la jena aŭd-vida programo:

- 1 BRAZILO-KONTINENTA LANDO: sonbendo kaj lumbildoj;
- 2 BESTETOJ, BESTEGOJ KAJ BESTAĈOJ: sonbendoj kaj lumbildoj;
- 3 deklamado: du poemoj el la supera kurso AŨDU KAJ LERNU 3(pretigata);
- 4 lanĉo de 3 novaj verkoj de Sylla Chaves: BESTETOJ, BESTEGOJ KAJ BESTAĈOJ - Libro;

BESTETOJ, BESTEGOJ KAJ BESTAĈOJ - sonbendo;

PAZ, AMOR E NATUREZA - portugallingva disko, kies baldaŭ aperonta Esperanta traduko es tas parto el la kurso AŨDU KAJ LERNU 3.

INFANOJ LERNAS ESPERANTON - ITALUJO

Infanoj sep-ĝis ll-jaraj partoprenas esperanto-kurson, kiel nedevigan lernobjekton, ĉe ele menta lernejo en Sardinujo. Ordinare, ĉiu grupo da infanoj havas lecionojn dufoje en la semajno, dum kiu ili parolas, kantas, ludas, ktp. La rezultoj de tiu laboro estas enrigis tritaj en kasedoj, kuij oni liveras al la interesitoj ĉe F-ino Maria Murgioni, via Guglied mo Pepe 19, Pirri, I-09100 Cagliari, Italujo.